
# *Fidel Castro anta? UN: historia parolado*

Image not found or type unknown



Havano, sep 26 (RHK) La kuba prezidento, Miguel Díaz-Canel elstarigis hodia? la validecon de la parolado de la historia gvidanto Fidel Castro en UN de anta? sesdek jaroj.

Per la socia retejo Tvitero, la insula ?tatestro emfazis ke la kuba Revolucio markis turnopunkton per tiu parolado en Unui?intaj Nacioj.

Díaz-Canel citis la vortojn de Fidel kiam diris: “Nia ?anco por diri la veron estas tiu ?i, kaj ni ne perdos la okazon ?in esprimi.”

La? la insula prezidento, Kubo ?iam alparolos la mondon sub tiu principo. De anta? 60 jaroj, la 26-an de septembro, la tiama ?efministro parolis por la unua fojo anta? la plej granda organo de UN kaj ties parolado, preska? 5-hora, estas inter la plej longaj tie eldiritaj iam ajn.

Krome, estas unu el la plej kritikaj kaj fortaj kontra? la filozofio de milito kaj forrabo.

La denunco farita kontra? pluraj agoj de la usona registaro kontra? la kuba Revolucio kaj uzo de perforto per la kreskinta  milita konkurado, estis la ?efaj argumentoj de tiu parolado, kiu provokis grandajn apla?dojn.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/235166-fidel-castro-antau-un-historia-parolado

Radio Habana Cuba